
# P. Tito Bransma O. Carm.
# Martiro en la Dachau-koncentrejo antaŭ 30 jaroj

artikolo de P. Manuel CASANOVES, CMF
en Espero Katolika 1973, n° 4



Mi tre ĝojas, ke en E.K. oni ofte parolis pri Patro Maksimiliano M. Kolbe, la pola franciskana martiro, kiun la Papo proklamis Beata antaŭ unu jaro; kaj pro tio ke dum la 34a IKUE-Kongreso en Como oni disdonis bildetojn kun dorsflanke presitaj biografia skizo pri beata Maksimiliano M. Kolbe kaj preĝo. Kompreneble, tre interesis min la esprimo «Kavaliro-Esperanto».

Nu, same kiel per la heroa morto de Patro Kolbe heliĝis eĉ tia hontinda abomenaĵo kia estis la koncentrejo de Oŝwiecim (germane Auschwitz), tiel ni rajtas fieri ankaŭ pri la nederlanda martiro Patro Titus Brandsma, kies sankta morto lumigis la ne malpli abomenindan Dachau-koncentrejon.

Anno Sjoerd Brandsma naskiĝis en Frislando la 23-an de februaro 1881. La 17-an de septembro 1897 li eniris la novicejon de la Karmelanoj en Boxmeer. Tie liaj frisaj nomoj Anno Sjoerd ŝanĝiĝis al Titus (kiu cetere estis la nomo de lia patro). Sacerdotiĝinte en 1905, li tuj estis sendita al la Romaj universitatoj, kie doktoriĝis pri filozofio en 1909. Dum multaj jaroj li instruis la junajn samordenanojn en la Karmel-seminario de Oss, kaj estis asistanto de la Karmelana Provinco en Nederlando. Ekde 1923 li estis profesoro en la Nimega (Nijmegen) Katolika Universitato, kies Moŝta Rektoro (Rector Magnificus) li poste fariĝis (1932-33).

Li skribis, interalie, lernolibron pri la frisa lingvo. Li multe verkis pri la «spirita heredaĵo» de la nederlanda popolo kaj pri la speciala karaktero de la nederlandaj mistikuloj. Li estis granda apostolo de la ekumena movado kaj entuziasme laboris por la unuiĝo de la Orienta kaj Okcidenta Eklezioj. Li kuraĝe defendis la tiam persekutatajn judojn. Simile al Patro Kolbe, li estis senlaca batalanto per la pacaj armiloj de la katolika gazetaro, kiu, pro ĝia efika povo, fariĝis unu el la ĉefaj celoj de la naziaj atakoj. Fakte, Patro Tito Brandsma sin mem kondamnis al morto kiam, la 31-an de decembro 1941, kiel nacia konsilanto de la Asocio de Katolikaj Ĵurnalistoj kaj reprezentanto de la nederlanda episkoparo, li sendis al ĉiuj katolikaj ĵurnaloj tiun faman kuraĝan dokumenton, per kiu li deklaris la tiaman situacion jam ne plu eltenebra: «la limo estas jam atingita» («de grens is bereilkt» ).

La 19-an de januaro 1942, tiu «eta monaĥo danĝera» estis arestita de la SS-viroj kaj kondukita al Scheveningen, en kies karcero li pasigis sep semajnojn en izolita ĉelo. Tie li verkis la faman artikolon «Mijn Cel» (Mia ĉelo), la belan poemon «Voor het beeld van Jezus in de gevangenis» (Antaŭ la bildo de Jesuo en mia karcera ĉelo), kaj entreprenis ankaŭ la taskon verki biografion pri sankta Teresa de Avila (ĝi restis nefinita, kaj post la milito Patro Brocardus Meijer, O. Carm, kompletiĝis kaj publikigis ĝin -Utrecht 1946). Poste li estis transportita en la Amersfoort-koncentrejon kune kun aliaj 105 malliberuloj, kaj fine, la 12-an de junio 1942, en la malbonfaman Dachau-koncentrejon. Tie li spertis ĉiuspecajn kruelaĵojn kaj mortis la 26-an de julio 1942, je la 2a horo frumatene.

Supraĵe rigardate, li estis nur unu el tiuj miloj da nekonataj homoj, kiuj estis tie ekstermitaj — «Grab Tausender Unbekannter — Grave of Thousands Unknown» (Tombejoj de miloj da nekonatuloj), oni nun legas en la tiama koncentrejo.

Sed tuj poste, kaj pli ankoraŭ post la milito, envenis vera lavango da kondolenc- kaj laŭd-mesaĝoj, inter de la Reĝino de Nederlando, de Kardinalo De Jong, kaj de aliaj altrangaj eldeziuloj kaj intelektuloj, ankaŭ protestantaj; ĉiuj atestis pri la apostola agado kaj heroaj virtoj de tiu tute neordinara homo.

En E.K., Junio 1971, p. 88, aperis mallonga informo («Ĉu baldaŭ nova sanktulo nederlanda?...» ) pri la komenco de la beatiga proceso de Patro T. Brandsma. Nu, se mi ne eraras, tio estas la sola sciigo pri li iam aperinta en E.K. (tamen mi ne estas tute certa, ĉar mi ne povis konsulti ĉiujn malnovajn jarkolektojn de la revuo). Ankaŭ la artikolo de D-ro W. Solzbacher pri «Katolikaj Esperantistaj Martiroj» (E.K., Junio 1946, p. 86-87) nenion diras pri li. Tiun silenton mi opinias des pli mirinda, ke Patro Brandsma estis ne nur esperantisto sed eĉ IKUE-ano. Preskaŭ certe niaj estimataj gefratoj en Nederlando tion scias; tamen mi devas konfesi esti neniam ion leginta aŭ aŭdinta pri tiu grava fakto ĝis kiam, antaŭ kelkaj monatoj, mi havis la eblecon tralegi kelkajn malnovajn jarlibrojn de IKUE. Kiom mi ĝojis neatendite legante la nomon de «Pastro Prof. Titus Brandsma - Nijmegen» en la Jarlibroj de 1926 (p. 61), 1928 (p. 72) kaj 1931-32 (p. 78) ! (aliajn antaŭmilitajn Jarlibrojn mi neniam vidis).

Ĉu en la pli ampleksaj nederlandlingvaj biografioj de Patro Brandsma verkitaj de la ĵurnalisto H.M.F. Aukas (1947) kaj de la karmelano Patro B. Meijer (1951) troviĝas io rilate al Esperanto? Mi scivolas, kaj samtempe invitas la nederlandajn IKUE-anojn al traserĉado. Eble ili konas eĉ anekdotojn.

Mi tre ĝojos, se mia hodiaŭa kontribuaĵo montriĝos tute senutila pro tio ke la esperantisteco de Patro Tito Brandsma estas fakto jam vaste kaj delonge konata. Dume, mi malkaŝe konfesas mian ĝisnunan nesciadon.

Manuel CASANOVES, CMF
(EK 4/1973)

# La moderna martiro Tito Brandsma estis esperantisto

Dimanĉon 3.11.1985, papo Johano Paŭlo la Dua proklamis beata patron Tito Brandsma, pereintan en la germana koncentrejo Dachau en 1942.

Naskita en la nederlanda regiono Frislando en 1881, li fariĝis karmelana pastro en 1905. Li estis korpe malsanema sed fizike energia. «Mi estas denaske optimisma», li diris pri si mem. «Ne esperu, ke li ŝanĝos opinion! Li estas danĝera homo!»; jen la vortoj de nazia policano post esplora demandado.

Doktoriĝinte pri filozofio en Romo, patro Brandsma revenis al Nederlando kaj sin dediĉis al la ĵurnalisma aktivado, kiu estis la granda intereso de lia tuta vivo. Ekde 1923 li estis profesoro pri filozofio kaj historio de mistiko en la katolika Universitato de Nimego. En 1935 la ĉefepiskopo de Utrecht elektis lin spirita zorganto de la katolikaj ĵurnalistoj.

Kiam, en majo 1940, Hitler invadis Nederlandon, patro Tito jam estis konata kiel unuavica en la kontraŭnazia aktivado. Fronte al la perforto kontraŭ hebreoj kaj kelkaj katolikaj establoj, patro Tito ne silentis; kaj kiam Hitler klopodis altrudi al la gazetaro siajn ideojn kaj silentigi la kontraŭulojn, patro Tito skribis al la katolikaj ĵurnalistoj: «Sciu la redakcioj kaj estraroj, ke ili devos formale malakcepti la altruditan komunikon, se ili deziras konservi la katolikan karakteron de la gazeto. Tio eĉ se la malakcepto alportus minacojn, monpunojn, portempajn aŭ definitivajn fermojn... ». Kaj li finis skribante: «Nia unueco estos fonto de forto».

La konflikto kun la nazia reĝimo kulminis en 1942 per aresto de patro Brandsma, kiu, jam 60-jara, spertis la rigorajn malliberejojn, la enketojn, la suspektojn. Post etapoj en diversaj nederlandaj karceroj, li atingis, 19.6.1942, la germanan koncentrejon Dachau.

Nemultajn tagojn post lia malliberigo, li skribis, citante sanktan Terezan: «Nenio vin zorgigu, nenio vin teruru; ĉio pasas, Dio ne ŝanĝiĝas; pacienco venkas ĉion; al tiu kiu havas Dion nenio mankas: nur Dio sufiĉas». Kaj li aldonis: «La vokiĝo por la Eklezio kaj la pastreco riĉigis min per multaj dolĉecoj kaj multaj ĝojoj, tiel ke mi volonte akceptas tion, kio povus ŝajni malagrabla... Kvankam mi ne scias, kiamaniere la afero finiĝos, tamen mi ja scias, ke mi estas en la manoj de Dio: kiu min disigos de la amo de Dio?».

Patro Tito travivis la semajnojn antaŭ la Pasko-festo en la infera karcero Amersfoort. En la Sankta Vendredo, kiu estas memorigo de la morto de Kristo, patro Tito parolis al la kunkarceranoj pri la sufero kaj morto de Jesuo, komparante ĝin kun ilia situacio. Pli poste, en la koncentrejo Dachau, lia partopreno en la sufero de Kristo fariĝis pli intensa: piedfrapoj, vundoj kaj tiel plu. En tiu aĉa loko, kie plu ne ekzistis humaneco kaj amemo, patro Tito ne zorgis pri si mem, sed nur pri la aliaj, tiel ke ĉiuj, kredantoj kaj nekredantoj, alpremiĝadis al li.

«Li estis afabla eĉ kun la SS-policanoj» deklaris atestanto. Liaj preferoj estis favore al la malsanuloj kaj mortantoj.


Korpe elĉerpita, li travivis siajn lastajn vivotagojn en la kuracejo de Dachau. Tie laboris juna flegistino, al kiu oni ĵurigis, ke Hitler estas la unusola Dio. Nu, tiu virino surpriziĝis, ke malgraŭ siaj suferoj, patro Tito havas afablajn vortojn al ŝi, kiun ĉiuj malamis. «Iam - ŝi rakontas - li prenis mian manon, kaj diris al mi: kiom malfeliĉa vi estas! Mi preĝos por vi; kaj li donis al mi sian rozarion, por ke mi preĝu. Mi respondis, ke ĝi senutilas, ĉar mi ne kapablas preĝi. Li respondis, ke mi tamen eldiru la duan parton de la preĝo Saluton Maria, nome: preĝu por ni pekuloj».

La flegistino trovis patron Tito sinipatia, tamen, ŝi rekte kunkulpas en lia ekzekuto: «Mi faris al li injekton - ŝi rakontas - de fenolo je la unua kaj 50 minutoj. La tutan tagon mi malbonfartis. Tiu injekto profunde impresis min, male ol la aliajn fojojn, kiam mi tute ne impresiĝis. Li mortis je la dua posttagmeze. Mi ĉeestis je lia morto».

Ĉi tiu virino, dank' al patro Tito, konos la ĝojon de la kredo, kaj novan vivon en la amo.

Patro Brandsma estis Esperantisto, kaj eĉ IKUE-ano. En malnovaj jarlibroj de IKUE (ekz. de jaroj 1926, 1928 kaj 1931-32) eblas legi lian nomon kaj adreson (pri tio aperis artikolo de P. Manuel Casanoves en EK de aprilo 1973).

Estas la unua fojo, en la tuta historio de IKUE, ke IKUE-ano estas oficiale suraltarigita!


— 72 —

F-ino T. Boumans, Oldemolenstr. 20, Heerlen.
Pastro B. Bouwhuis, kaplano, Andelst.
S-ro H. v. [illegible] sche weg 203, Tilburg.
Pastro Prof. D-ro T. Brandsma, Kronenburgersingel 31, Nijmegen.
S-ro J. Brekelmans, Koestr. 50, Tilburg.
F-ino R. [illegible], Tilburg.
S-ro P. H. Brinkman, Broekhovensche weg 189, Tilburg.
S-ro Th. Brinkman, St.-Jacobusgesticht, Wassenaar.
S-ro D-ro v. d. Broek, kuracisto, Cuyk.
F-ino A. v. d. Broek, Korte Kerkstraat, Boxtel.
S-ro J. v. d. Broek, Burg. Savelbergstr. 1, Heerlen.
S-ro C. Broekmans, St. Agatha, Cuyk.
S-ro G. Brohm, N. Z. Haven 132, Bergen-op-Zoom.
S-ro A. Th. J. Brokken, Akkerstr. 108, Tilburg.
S-ro Brorens, Dankenbergstr. 17, Heerlen.
S-ro A. Brouver Jzn, Groesbeeksche dwarsweg 222, Nijmegen.
F-ino R. de Brouwer, Tuinstr. 58, Tilburg.

— 73 —

S-ro H. v Calsteren, Constant Rebequestr. 34 's Gravenhage.
S-ro C. Cappelz, Bankakade 11, Wormerveer.
S-ro H. Ceelens, Maasheuvel 60, Roosteren.
S-ro J. Ceka, Akerstr. 113-A, Heerlen.
Pastro H. J. Claassens, parohestro, Vinkel (N. Br.)
S-ro W. J. M. Cordewener, Kampstr. 48, Heerlerheide.
F-ino R. v. Corven, St.-Josephstr. 45, Tilburg
S-ro H. Cras, Staringstr. 23, Eindhoven.
S-ro P. Crijnen, Wouwsche weg 160, Bergen-op-Zoom.
S-ro A. J. v. Dam, Nachtegaalstr. 39, Amsterdam
S-ro H. Damen, Brugstr. 10, s' Hertogenbosch.
F-ino C. Dames, Raadhuisstr. 3, Heemstede.
S-ro L. Dankers, Besterdstr. 43, Tilburg.
S-ro D-ro L. Deckers, Juliana v. Stolberglaan 113, 's Gravenhage.
F-ino T. Dekkers, Heuvelstr. 82, Tilburg.
S-ro J. v. Diemen, Koolsteeg 3, Haarlem.
Monsinjoro A. F. Diepen, Episkopo, Bissch. Pa-

*el malnova jarlibro de IKUE*